Theodor Storm,

# Oktobra lido

*tradukita de Richard Schulz*

Folioj falas en nebul'.
Ni vinon nun gustumu!
La grizan tagon kune ni
Orumu, ja orumu!

Kaj turbulentas la veter'
Kristane aŭ pagane,
La Tero estas ja la Ter':
La vento bruas vane.

Kaj plendas iam ajn la kor', -
Tintigu ni la glasojn!
Ni scias ja, bravega kor'
Ne timas embarasojn.

Folioj falas en nebul'.
Ni vinon nun gustumu!
La grizan tagon kune ni
Orumu, ja orumu!

Aŭtunas, sed atendu nur,
Atendu iomete!
Printemp', violoj kaj ĉiel'
Ridados ĉiuj vete.

Ebriaj tagoj ekas nun.
Ne volas ni enui.
Ni volas ilin, kara ul',
Elĝui, ja elĝui.

...

Theodor Storm,

# Oktobra kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nebulas, falas foliar';
La glason vi plenigu!
La grizan tagon ni al ni
Per vino pliheligu!

Se furiozas ĉio ĉi
Ekstere en la mondo,
Ne estas detruebla ja,
La bela tera rondo!

Se tremas ankaŭ via kor',
La glasojn vi tintigu!
La ŝtormo ekster nia dom'
Min ne malkuraĝigu!

Nebulas, falas foliar';
La glason vi plenigu!
La grizan tagon ni al ni
Per vino pliheligu!

Aŭtuno regas ĉie, sed
Atendu nur tempeton![2]
La suno ridos, la printemp'
Kreskigos ja floreton.

La bluaj tagoj ekas nun,
Ni volas ilin ĝui;
La tempo fluas, vane ni
Ne lasu ĝin forflui!

...

[2] aŭ eble:
Atendu nur momenton!
La suno ridos, la printemp'
Kalmigos ja la venton.

*Traduko de la Germana poemo "Oktoberlied" de* Theodor Storm *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-174-352 (2013-02-26 15:14:48)*

*La traduko estas - kun permeso de la eldoninto, sinjoro Hermann Behrmann, prenita el la libro "La muzino" de Rikardp Ŝulco (Richard Schulz), eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn', Germanujo, en 1992. Ĝi troviĝas ankaŭ en la numero 6/1984 de la GEA-organo "Esperanto aktuell". Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Traduko de la Germana poemo "Oktoberlied" de* Theodor Storm *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-174-351 (2004-02-22 17:52:01)*